

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 289 (56) - KVINA EPOKO

JUNIO 1994

ISSN 0023-3692

KONTAKTO

numero 140 (1994:2)

**Futbala Mondpokalo:
ek al Usono!**



© 1992 WC'94/SL

facila ĉefartikolo:

ni
parolu pri
la

VVO

- Insektomangaj floroj
- *tentaklo* bolas!
- Infanoj en milito
- Lasta ĉapitro de *Lalande*
- Kiel trovi perditajn laŭ kuba recepto

■ Esperanto-kursoj

■ Unesko-rezolucio

■ Seminarioj pri
lingvoj kaj rasismo

■ Kontakto ĉe ni

■ Kursoj
kaj prelegoj

■ Revue kaj televide

■ Burĥasoto kaj
Palmo-la-Majorko

■ Kiel vendi
esperanton?

■ Esperanto
kaj komunikiloj

**ASSOCIACIÓ
CATALANA
D'ESPERANTO**  **KATALUNA
ESPERANTO-
ASOCIO**

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)
Apartat/Postkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33, (93)710.96.36 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 16a kaj 20a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.
KOTIZOJ POR LA JARO 1994: Individua Abonanta Membro 3.000 p-toj; Individua Subtenanta Membro 6.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 60.000 p-toj; Kolektiva Membro 6.000 p-toj. Juna Membro 2.500 p-toj.
BANKO: Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.
PLENUMKOMITATO DE KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; **Vicprezidanto:** Maria Nuez-Garcés; **Ĝenerala Sekretario:** Llibert Puig; **Vicsekretario:** Hektor Alos; **Kasisto:** Lluís Armadans;
Komitatoj: Miguel Ángel Altuna, Bartomeu Costa, Joan R. Guinó, Girona Espero, Francesc Ibáñez, Joan Marimon, Josep Ma. Milla.
KONTROLA KOMISIONO: Tomàs Alberich, Ricard Jordana, Òscar Puig.
KATALUNA ESPERANTISTO: Hektor Alos, Ferriòl Macip, Llibert Puig.
La artikoloj publikigitaj en *Kataluna Esperantisto* ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.
KATALUNA ESPERANTO-JUNULARO: Apartat 32 318, 08080 Barcelona.
FREQUËNCIES: Apartat 1 163, 08300 Mataró (Maresme).

Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe **Ràpid Graf**. (93)725.50.91. Sabadell.

Esploro

Gazeto ne devas fariĝi nur ŝatata ĉevaleto de siaj redaktoroj. Ĉar ni celas, ke ĝi fariĝu interesa por kiel eble plej multaj ricevantoj, ni petas, ke Vi ĝentile plenigu la kune senditan enketilon kaj re-sendu al ni kun viaj sinceraj opinioj.

(Ni dankas la revuojn *Monato* kaj *Eventoj*, kiuj afable sendis al ni siajn enketilojn, kiuj tre utilis al ni)

Estis tempo, kiam dekoj da kursoj okazis samtempe en nia lando, Kataluna Esperanto-Federacio nombris centojn da membroj kaj kredeble kelkaj miloj scipovis paroli esperanton ĉe ni. Evidente, la esperanto-komunumo forte malkreskis ekde tiam: kurso, prelego aŭ surs-trata budo fariĝis novaĵoj, dum ni fieras pri mencio en gazeto kaj festas, se temas pri tele-vido.

Ĝojinde ĉio ĉi iom plioftiĝas en nia lando. La aktivado plu restas magra, sed ni povas kontenti, ke ĝi daŭras kaj progresetas. Plie, niaj aranĝoj kaj eldonaĵoj kreskigas generacion (ne laŭage kompaktan) serioze interesigantan pri esperanto kaj profunde ĝin konantan, kiu aplikas fakajn metodojn al esperanto.

Nuntempe multaj esperantistoj deziras ne konsideri niajn lingvon kaj komunumon kvazaŭ io, kio ne obeus la regulojn de la naturo: esperanto devas esti instruata kiel ĉiu fremda lingvo, reklamata laŭ la instruoj de moderna merkato, verkata kaj recenzata tiel altnivele kiel ĉe nacia lingvo, kaj ĝuata pro tio, kio ĝi efektive estas, prefere ol pro tio, kion iuj celas, ke ĝi fariĝu.

Tial ni devas nin gratuli pro la progresoj de nia afero, sed necesas plu serioze studadi esperanton samkiel merkataĵon, ĵurnalistikon, recenzadon ktp., se ni volas kreski. Nur kvalito portos nin, eble, kvanten.

**3a Eŭska
medioĝuo**

**9a - 14a aŭgusto
GASTEIZO (Eŭskio)**

**4a KEJ-diskutkunveno:
BABELE BABILI**



*Bunte, amuze,
fake pri lingvoj*

**29a de oktobro - 1a de novembro
SANT CELONI (Vallès Oriental)**

KEA-arangoj

La 18an kaj 19an de junio okazis renkontiĝo en Tortosa, pri kiu ni informos en la venonta numero. Oni planas okazigi novembre semajnfinan seminarion pri rasismo, en kiu partoprenos naciaj kaj esperantaj fakuloj. Informoj sekvos.

KEJ-arangoj

Kataluna Esperanto-Junularo kunvenis dekkvinope la 21an kaj 22an de majo en Orrius (Maresme) pri informado. Hektor Alos prezentis du dosierojn, kiujn KEA preparis por sin prezenti antaŭ Acció Cultural del País Valencià kaj Generalitat de Catalunya. Jordi Armadans prelegis pri kiel esperantistoj devas rilati al la amas-komunikiloj (vd. p. 9).

KEJ pretigas nun sian 4an Diskut-Kunvenon (*Babele babili, bunte amuze, fake pri lingvoj*), okazontan en Sant Celoni (Vallès Oriental) inter la 29a de oktobro kaj la 1a de novembro.



Kurso en la Guingueta d'Ix (Norda Cerdanjo). Temas laŭ nia scio pri la unua kurso kun lernantoj el norda kaj suda Katalunioj. La dua maldekstre sur la foto estas instruisto Hélène Bonis.

Barcelona

La 8an de aprilo, Carles Berga prelegis pri esperanto en *Escola d'Adults del Clot* antaŭ trideko da homoj. La prezento vekis grandan intereson kaj multajn demandojn.

Premià de Mar

Hispana Esperanto-Fervojista Asocio (kolektiva membro de KEA) organizis feston en Premià de Mar, kie oni inaŭguris placon Esperanto.

(Esperanto)

Nou reconeixement a l'esperanto: Resolució de la UNESCO

Per tercer cop, la Conferència General de la Unesco va aprovar una resolució favorable a l'esperanto. La novetat més significativa ha estat que per primer cop es demana als estats de concretar accions en favor de la llengua internacional.

La Conferència General,

Recordant la Recomenació sobre Educació per a la Comprensió, Col.laboració i Pau Internacionals de 1974 i les Recomenacions del Congrès Internacional sobre Pau a les Ments de les Persones (Yamousoukro, Costa d'Ivori, 1989),

Considerant el paper fonamental que la comunicació lingüística a l'abast de tots pot jugar en l'avanç de la pau i de la comprensió entre els pobles,

Recordant la resolució IV.1.4.422-4224, per la qual la Conferència General de

1954 a Montevideo va reconèixer "els resultats assolits per l'esperanto en el camp dels intercanvis intel.lectuals internacionals i per l'aproximació dels pobles del món" i "que aquests resultats corresponen als objectius i ideals de la Unesco",

Recordant la resolució 11.11, per la qual la 23a sessió de la Conferència General de la Unesco va demanar al Director General continuar resseguint "amb atenció l'evolució de l'esperanto com a mitjà per millorar la comprensió entre nacions i cultures diferents" i convidava als Estats-Membres a "promoure la introducció d'un programa d'estudis sobre el problema lingüístic i sobre l'esperanto en les seves escoles i institucions d'ensenyament superior",


Considerant a més que, en el quadre dels darrers treballs sobre traducció automàtica, l'estudi del paper específic que pot

jugar una llengua com l'esperanto pot mostrar-se de gran interès,

Demana al Director General considerar els resultats assolits pel moviment que promou l'esperanto: (a) en una **memòria sintètica** sobre l'elaboració de programes d'estudis, sobre preparació de professors i sobre novetats en el camp de l'educació per a la comprensió internacional, la pau, els drets humans i la democràcia, (b) en un **manual** que caldrà redactar sobre principis rectoros per la comunicació de valors de la pau;

Demana per això als Estats-Membres informar dels treballs endagats com a conseqüència de la resolució 11.11 de 1985, especialment en allò relatiu als programes d'estudis sobre l'esperanto i els seus resultats.

París, 15 de novembre de 1993



Llibert Puig, Luz Vázquez, Salvador Gumà kaj Pedro Martín en Centre de Lectura de Reus



Josep Virgili, Joan Marimon kaj Núria Olléeren la Rambla Nova de Tarragona

Reus

La 11an de marto Salvador Gumà prelegis pri esperanto en la prestiĝa kultur-centro *Centre de Lectura de Reus*. Post la prelego intervenis Pedro Martín, kiu informis pri la koresponda kurso de nia asocio, kaj la ĝenerala sekretario de KEA, Llibert Puig, fermis la aranĝon per konciza informo pri la kulturaj valoroj de nia lingvo. Dum kelkaj tagoj eblis viziti ekspozicion pri esperanto en la ejo. Komence de majo komenciĝis ses-persona kurso, gvidata de Josep Virgili. La tuton organizis nova KEA-membro Luz Vázquez, lerninto de nia perkoresponda kurso.

Santa Coloma de Gramenet

Denove Centre Puigcastellar gastigas esperanto-kurson, kiun partoprenas ses lernantoj.

Vilanova i la Geltrú

Post kelkjara paŭzo denove reaktiviĝas la loka movado, kiu nun havas sian sidejon en la loka civitana centro *Sant Joan* kun la nomo *Esperanto-Grupo de Vilanova*. Kiel unua publika aranĝo, okazis du prelegoj de Josep Maria Milla kaj Llibert Puig, estraranoj de KEA la 22an de januaro, disanoncitaj tra la lokaj komunikiloj. La tiea radiostacio intervjuis Llibert Puig. Sekve, oni malfermis kurson kun deko da partoprenantoj.

Libro-tago

Ni eksciis pri la starigo de esperantaj budoj la libro-festan tagon (23an de aprilo) en Figueres, Sabadell kaj Tarragona. Eble la plej sukcesaj montriĝis la taragonanoj. Iliaj vendoj estis: 20 ekz. de *l'Esperanto en 24 paĝines*, 10 ekz. de *Curs de la llengua internacional*, 5 ekz. de *60 Amkantoj* kaj 1 abono al *Freqüències*. Krome, ses personoj listiĝis por estonta kurso de esperanto.

Prima de las lengas

La 16an de majo, Hektor Alos prelegis en Tolosa (Okcitanio) pri "*la rolo de la regionaj lingvoj kaj esperanto en Eŭropo*". La aranĝon organizis Esperanto-Kultur-Centro kadre de plurmonata festivalo (*Prima de las lengas*, Printempo de la lingvoj), kiun duafoje organizas grupo de tolosaj kulturaj asocioj.

Kontakto

Ĉiuj membroj de KEA aĝantaj pli ol 30 jaroj ricevos ĉi-jare la revuon *Kontakto*. Temas pri la ne-movada periodaĵo de TEJO, kiu dank' al sia nuna redaktoro fariĝis eble la plej okul-frapa revuo en esperanto. Kvankam junulara, *Kontakto* estas

interesa por ĉiuj aĝoj kaj lingvo-nive-
loj. Membroj de KEJ, kiu deziras ĝin
ricevi, povas aboni ĝin kontraŭ nur
1.200 p-toj (malpli ol duono de sia
prezo).

Nova lernolibro

Kataluna Esperanto-Asocio interkonsentis kun Heroldo de Esperanto por la eldono de baza lernolibro por katalunlingvanoj. Ĝin verkas Pedro Martín Burutxaga, mezlerneja instruisto de la angla kaj germana lingvoj, kiu uzas modernajn nacilingvajn modelojn. Oni esperas, ke la verko estos preta en 1996.

Esperanto televide

Esperanto ŝajne enhejmiĝis en TV3. La fama felietono *Poble Nou* jam kvar-ĉapitre menciis la internacian lingvon. En la intrigo, onjo Victòria gardas kiel trezoron avan leteron, kiu poste montriĝas verkita en esperanto. Tial oni serĉas tradukiston, kiu plezure plenumas la mendon, "*ĉar oni havas malmultajn okazojn praktiki esperanton*". Aldone, en alia serifilmo, *La rüga nano*, kosmo-ŝipestro iom studas nian lingvon. Fine, la 4an de aprilo, en tre konvena horo, en la fina rubriko de la vesperaj novaĵoj, oni kelkminute prezentis esperanton per muntita dosero. En ĝi oni rapide

kombinis eldirojn de aktivuloj kaj lernantoj, erojn de la filmoj *La ciutat cremada* kaj *La granda diktatoro*, kaj fine ĵurnalisto tostis en esperanto. Bedaŭrinde, la aĝo de la esperantistoj kvazaŭ pravigis la eksecon de nia afero aluditan en *Poble Nou*, kaj la konkludo de novaĵ-prezentisto, ke tamen la angla venkis, iom akriĝis tiun tamen bonan reklamon.

Revue en Reus

La revuo *La Ilettra A* el Reus publikigis en sia februara-marta numero tutpaĝan artikolon pri preparata esperanto-rok-kompilaĵo. La artikolo prezentas Eurokka, la asocio, kiu eldonas la revuon *Rok-Gazet'* pri esperanta kaj roka muziko. Ĝi varbas por mendo de interesa aperonta duobla kasedo kaj kompaktaĵo de amaseto da tre diversaj ensembloj kantantaj esperante. Atentinde, la artikolo aperas en la hispana kaj en esperanto. Ankaŭ nacilingve oni petas sendi 116 francajn frankojn por la kompakt-disko aŭ 83 por la kasedo al la UEA-konto *rokk-b* aŭ post-gire al:

Vinilkosmo p/a Eurokka
Esperanto-Rok-Asocio
31450 Donneville (Okcitanio)

En la sama numero, aperas ankaŭ longa letero pri esperanto de nia aktivulo Joan Marimon.

KCE jubileas

Kultura Centro Esperantista, la plej grava el la esperantistaj kursejoj, fariĝis 25-jara. Ĝi estis fondita la 15an de decembro 1968 en la svisa urbo La Chaux-de-Fonds. De tiam kelkdeko da kursoj, seminarioj kaj renkontiĝoj okazas ĉiujare: dum 1993 30 aranĝoj altiris 200 stagantojn el dudeko da landoj. Evidente la kvanto da partoprenantoj ne postsekvas la altegan kvaliton kaj varion

de la entute konsilindaj aranĝoj. Krome, ne eblas forgesi, ke la Centro posedas tre bonan libroservon, kaj ke en la urbo ekzistas unu el la plej bonaj interlingvistikaj bibliotekoj el la mondo.

Klingon-novaĵoj

Jam forvendiĝis 300 000 ekzempleroj de la vortaro *klingon*-angla kaj angla-*klingon*, kreita de kunlaboranto de la TV-serio *Star trek*. Krome, kelkaj studentoj el Minnesoto ektradukis *Biblion* al ĉi pseŭdo-ekstertera lingvaĵo.

(Avui)

Reago

En *Kataluna Esperantisto* (nov. 1993) aperas, kun aparta reliefo, danko de Roman Dobrzynski pro invito al literatura forumo. Tial ke la danko situas en la sama paĝo kun raporteto pri la 12a Internacia Literatura Forumo, organizita en Barcelono de KEA kaj LF-Koop, ni informas, ke Roman Dobrzynski neniam estis invitita de la organizintoj de la 12 ILF. Surprizas nin, cetere, ke la sama raporteto neniel mencias alian polon, kiu efektive ĉeestis kaj prelegis: Walter Zelazny.

Giorgio Silber
Prezidanto de LF-Koop

KEA informas, ke, kvankam ĝi ne invitis specife s-ron Dobrzynski, ĝi solidariĝis tamen kun lia plendo pri vizaj obstakloj. Felice intertempe la problemo parte solviĝis, ĉar polaj civitanoj ne plu bezonas vizon por viziti nian landon. La redakcio de *Kataluna Esperantisto* bedaŭras, ke pro senintenca forgeso oni ne mencias en la raporto la nomon de s-ro Zelazny, kies kunlaboron en la forumo ni sincere dankas.

Absurda adresaro

La lasta eldono de la SAT-adresaro (1993-1994) uzas pseŭdo-esperantajn urbonomojn. Ekzemple, la urboj el la Katalunaj Landoj estas jene esperantigitaj: *Alkanto, Alteo, Barcelono, Burhasoto, Esparagvero, Kaljoso-de-Seguro, Palafrugelo, Palmo-la-Majorka, Perpinjano, Puerto-de-Solero, Rubio, Sabadelo, Sankt-Kugato-de-Valoj, Teraso, Uljastrelo, Valencio, Vilafranko-de-Panado, Vilanova-kaj-Geltruo*. Evidentas, ke la kriterioj, laŭ kiuj oni tradukis la nomojn estas tute malkoheraj: // esperantigas jen *lj*, jen *l*, jen *j* (eĉ en la sama urbo: komparu *Ullastell* kaj *Uljastelo*); *Vallès* fariĝas *Valoj*, sed *Penedès* iĝas *Panado* ktp. La tradukoj estas el la hispanlingvaj urbo-nomoj (aŭ hispana prononco de la kataluna nomo), dum plej ofte (ĉiam en Katalunio kaj Balearoj, plej ofte en Valencilando, nur pro koincido en Roselono) la nuraj oficiale agnoskitaj formoj estas la katalunaj. Krome oni absurde surmetas francan veston (kio estas *Palma-la-Majorka?*, kial tiu strekemo?) aŭ foje ne nur transkribas,

sed eĉ (duon-)tradukas: *Sankt-Kugato-de-Valoj, Vilanova-kaj-Geltruo*. Kial do ne: *Sankta-Kukufato-de-la-Valoj, Nova-Urbo-kaj-la-Hela-Truo* ktp?

La supra manpleno da ekzemploj jam evidentigas, ke la aferon oni entreprenis plej nekompetente. Enkonduke (sub la devizo *Aŭdaco! Ankoraŭ Aŭdaco! Ĉiam Aŭdaco!*) iu Kulo transprenis la tutan respondecon de ĉi sensencaĵo (aŭ, por uzi liajn vortojn, "senĝena propono"), dum li treege supraĵe skizis uzitan metodon kaj klopodis pravigi la uzon de esperantigitaj formoj. Bedaŭrinde pri tiu eksperimento respondecas ankaŭ la eldoninta asocio (tre dankinda pro aliaj eldonaĵoj), kiu per tiu senzorga kripligo faciligas nur la misprononcon de nacilingvaj nomoj, ĵakobene lingve unuecigas ŝtatojn kaj malfaciligas la trovon de urboj.

Hektor Alos i Font

Ĉu oni povas surmerkatigi esperanton?

Dum kvin tagoj oni pridiskutis tiun tiklan temon en staĝo, kiu okazis somere en Francio, en la esperanto-cento *Kvinpetalo*. La ĝenerala temo estis "Surmerkatigo de esperanto laŭ la modernaj teorioj de merkato".

Kiu devas informi pri esperanto?

Al esperantistoj mankas entreprenemo. Se ni analizas, fakte, kiuj estas la esperantistoj, ni povas dividi ilin en tri kategoriojn: la orienteŭropanoj, vivintaj dum generacioj sen iu ebleco fariĝi entreprenistoj; en la okcidentaj landoj - instruistoj, do ŝtataj dungitoj; intelektuloj aŭ laboristoj, kies ĉefaj interesoj neniam estis konsideri la lingvon entrepreneme.

Sekve, tiuj esperantistoj ĉiam klopodas "vendi" esperanton kiel lingvon aŭ kiel filozofion/religion (la interna ideo, la frateco, la dua lingvo por ĉiuj ktp.).

Kian esperanton vendi?

Tiu estis la plej grava parto, al kiu pli da tempo estis dediĉita, kaj kiu kontentige donis al la staĝantoj la eblecon revizii kelkajn bazajn opiniojn.

Laŭ la moderna merkato lingvoj posedas du partojn: *hard-an* (firman aŭ malmolan) kaj *soft-an* (molan).

Firma estas la strukturo, la gramatiko; ĝia norma parto. Mola estas la valoroj de la lingvo, ekz. ĝia literaturo, kulturo, la sento de prestiĝo, la praktika utilo...

Kiujn firmajn kaj molajn valorojn havas esperanto?

Tradicia propagando insistas per kutimaj sloganoj, kaj pro tio distingiĝas de la moderna lingvomerkatado.

Esperanto estas forta lingvo kompare al la aliaj en sia firma parto, sed malpli forta ol, ekz., la angla laŭ sia mola parto (nome la avantaĝoj ekonomia, kariera, por persona prestiĝo ktp.).

Surmerkatigi esperanton estas ĉefe tio: oni tendencas "vendi" ĝian

firman parton (facilecon, rapidan lerneblon, belsonecon) sed ne kapablas vendi la molan, nome la kulture pliriĉigajn valorojn. Ankaŭ, ĉar, ofte, la tradicia propagandisto mem ne bone konas ĝin. Estas klare, ke tiu mola parto ne konkeras amasojn; sed samtempe ĝi povas konkeri pli interesajn homojn, fari ilin pli celkonsciaj kaj reteni ilin en la lingvouzo. Tio signifas celi al kvalito antaŭ ol kvanto.

La enhavo de esperanto estas tero nekonata por la varbato, sed ofte ankaŭ por la varbanto!

Kiel surmerkatigi esperanto laŭ ĝia "mola" parto?

Tio signifas analizi la produkton laŭ tio, kiel ĝi situas en la merkato, kian bildon ĝi havas, kran postvendan servon kapablas doni. Ĉu nur kluban vivon, UK-ojn, festivalojn, bultenojn, aŭ, kiel en la makrosocio, kulturajn servojn?

Per analizo de fortaj kaj malfortaj punktoj de nia lingvo evidentiĝas interesaj "merkataj niĉoj", la celgrupoj, al kiuj oni direktu siajn informajn klopodojn. Kuncerbumado (la tiel nomita "cerbo-sturmo" de la profesiaj reklamistoj) inter la staĝantoj starigis longan liston de nekutimaj fortaj punktoj, tre ofte forgesataj de informistoj.

Post analizo de la mola parto de esperanto la staĝantoj ekzercadis pri tiu ne sufiĉe taksata aspekto (pli socia ol lingva), kaj sur tiu bazo oni verkis novtipajn mesaĝojn, celantajn al specifaj grupoj; la metodo, kiu, cetero, ŝparas monon kaj tempon.

Ankaŭ la analizo de konkurenco (ĉagreniga punkto) fariĝas, laŭ tiu ĉi vidpunkto, pli simpla, se ni akceptas rezigni disinformadon kaj preferas mesaĝi al selektitaj grupoj. Tiam ni jam de la komenco evitas sensukcese kontraŭbatali la ĉefan konkurencon, kiu estas "neniu intereso krom mono kaj kariero", aŭ "neniu kultura intereso". Tio konsciigu nin, ke esperanto ne taŭgas por konsumantaj amasoj, sed nur por elitoj, kvankam ne necese nombre limigitaj; ke kvalito multe pli gravas ol kvanto; ke

nova pozitiva bildo por esperanto devas veni de esperantistoj mem, kiuj formu altnivelan klason, kiu povos pruvi al la makrosocio la verajn valorojn de tiu ne multnombra sed disa, unika mikrosocio.

Nome, ĉar ne plu eblas kaj eĉ ne interesas, almenaŭ dum venonta jardeko, ke esperanto fariĝu la "lingvo de flughavenoj", kiel Umberto Eco diris, restas nur unu alternativo: la Raŭma vojo.

Marco Picasso

(el *Eventoj* n-ro 41, novembro 1993)

Pri membro-kampanjoj

Reage al interesa artikolo de O. Princz (*Eventoj*, 2/januaro 1994), mi volas diri jenon. Ĉiu kampanjo estas io, kion en la gvidad-sciencoj oni nomas *ag-ciklo*. Agciklon oni kutime priskribas kiel konsistantan el dek fazoj. Por ke la agado sukcesu, necesas trairi ĉiujn dek fazojn, plenumante ĉiujn specifajn postulojn de ĉiu unuopa fazo. Jen la dek fazoj:

1. puŝmotivo;
2. analizo de ebloj;
3. defino de celo reala;
4. difino de rimedoj;
5. difino de metodoj;
6. elekto de realigantoj (kaj kunordigantoj);
7. kalendaro de ag-paŝoj, plano de plenumo;
8. kontrolo (retro-informo), eventuale korekto en plenumpaŝoj;
9. pritakso, analizo de rezultoj;
10. raporto, konkludoj.

Nun ni analizu, ĉu niaj agadkampanjoj vere estis kompletaj aŭ nur estis projekcio de deziroj (deziroj kaj planoj ne estas sama afero), instigitaj per la forto de la puŝmotivo.

Ja estas bele havi pli da membroj, sed ĉu eblas, kaj se jes, kiel?

Kiel fari tion, per kiuj rimedoj, metodoj kaj homopotencialoj? (Bv. noti, ke ne sufiĉas havi homojn, necesas ankaŭ ĝusta distribuo de la kapabloj.)

Laŭ mi, la problema demando ne estas "kial indas lerni esperanton?", sed "kial prezenti tiujn motivojn invite kaj konvinke por la eksteruloj". Tamen necesas katalogi ankaŭ tiujn argumentojn, kaj ne lasi, ke

ĉiu nova varbemulo dekomence malkovradu ilin. Alia eco de "agciklo", kaj kondiĉo de agsukceso, estas la ritmo, t.e. postulo, ke la agado ne ĉesu aŭ ne tro malintensigu.

Do, oni ne povas respondi, ĉu niaj kampanjoj estas realbazaj, antaŭ ol unufoje oni faros ilin "gustamianiere".

Nikola Rašić
(el *Eventoj*, 1/marto 1994)

Kial esperantistoj ne deziras kunlabori kun ne-esperantistoj?

20-jara sperto konkludigas al mi, ke la plej grava malamiko de esperanto estas kluba sektismo. Ofte, sajnas ke esperantistoj malsatas uzadon de la "kara lingvo" por nemo-vadaj celoj!

Jen mallonge ekzemploj, kiujn mi spertis kun la esperanto-movado.

Eŭropa Semajno de Eŭropa Asocio de Instruistoj

Danke al patro Bussé, lernejestro en Hannut, esperanto iĝis laborlingvo apud la franca, la germana kaj la nederlanda dum ĉiujara Eŭropa Semajno; tio okazis en Hannut (Belgio) kaj en Freiburg (Germanio). Bedaŭrinde kaj malgraŭ antaŭavertoj, samideanoj kondukis sekte kaj tedegis aliajn partoprenantojn per senĉesaj klopodoj por esperantigi ilin.

Konkludo: la Eŭropa Semajno pliris sen esperanto!

Eŭropa Dokumentaro

Post preskaŭ du-jara kontakto kun estro de eŭropa centro, s-ro Goovaerts, instruisto pri fremdaj lingvoj, eblis aperigi esperanto-version de *Eŭropa Dokumentaro*, sed neniam eblis trovi en Bruselo samideanon por helpi pri korespondado en esperanto (ĉ. tri horoj monate); mi mem devis iri el Oostende pro prizorgi ĝin, ĝis kiam la eldonadon transprenis Eŭropa Klubo en Paderborn (Germanio).

Rilatoj ILEI/Eŭropa Asocio de Instruistoj

Traduk-reto

S-ro Kech, ataseo ĉe Ministerio pri Edukado kaj eŭropa prezidanto de EAI, petis starigon de traduk-reto

pere de esperanto por EAI. Sed la tiama ĝenerala sekretario de ILEI, d-ro Dazzini, rifuzis kunlabori pro stautaj kialoj!

Kiel EAI-ano mi funkciigis tian reton, al kiu kunlaboris esperantokolegaj el kelkaj landoj, i.a. Germanio, Grekio kaj Italio.

Rilatoj ILEI/EAI

ILEI petis kunlabori kun EAI kaj tiurilate mi partoprenis tri-tagan kunvenon en Paris, kie mi reprezentis ILEI-n kun s-ro Fairbank (Francio), Leon-Smith (Britio) kaj Piron (Svislando). Ni trafis kontentigan rezulton, sed, tiam, la estraro de ILEI (d-ro Dazzini kaj s-ro Sonnabend) aldonis nepran kondiĉon: ke esperanto estu LA sola laborlingvo por ĉiuj rilatoj.

Konkludo: la tuto fiaskis!

Monda Federacio de Kuracistoj kiuj Respektas la Homan Vivon

D-ro Schepens, ĝenerala sekretario de MFKRHV, jam tradukigis dokumentojn en esperanton kaj, de tri jaroj, konsentas ke *Esperanto-angulo* estu en la federacia bulteno. Sed, ĝis nun, UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) neniel reagis al tia propono.

Ĉu ne interesus ĝin kunlabori kun MFKRHV, kiu atingas ĉ. 350 000 membrojn el 70 landoj?

Blua mondĉeno/Asocio por la protektado de bestoj

Post esperantigo de Universala Deklaracio de la Bestaj Rajtoj, tiu asocio ricevis multajn leterojn en esperanto el diversaj landoj, eĉ el Ĉinio. Tia rezulto vekis intereso pri esperanto, sed, bedaŭrinde, ĝis nun (12.04.1993), ne eblis trovi bruselan

samideanon por helpi pri korespondado en esperanto (eble du-tri horojn monate)!

Konkludo

Pli kaj pli mi demandas min: ĉu vere indas vekigi intereso pri esperanto ĉe ne-esperantistoj?! Kiam ili pretas uzi esperanton, la esperantistoj mem rifuzas helpon, verŝajne ĉar ne temas pri tradiciaj klubajoj.

Laŭ mi, gravega manko en Esperantujo estas ekvilibro inter saĝa idealismo kaj sana realismo.

Se esperantistoj deziras, ke esperanto restu nur kluba hobia, tiam ĝi jam finvenkis de dekjaraj (aŭ jardekoj)!

Germain Pirlot
(el *L'esperanto*, IEF, n-ro 1/1994)

Al Asociació Tècnica i Cultural "Amiko"

Responde al anonceto en revuo Esperanto, la aŭtoro sendis la jenan leteron, sed ĝi estis resendita de la poŝto, ĉar la adreso estis erara.

Estimataj,

Mi legis Vian anonceton en la revuo *Esperanto* kaj tuj avertis Katalunan Esperanto-Asociacion pri Via ekzisto. Kiel estrarano de KEA, mi iom miras, ke mi nenion sciis pri Vi: ĉu ne estus pli logike, ke Vi unue Vin turnu al la lokaj esperanto-grupoj por peti helpon? Nu, negrave, ĉar unu-pafe Vi tion sukcesis.

Mi scivolemas pri la radio-stacio, kiun Vi planas starigi. Regula radio-programo estas malfacilega tasko, des pli pri esperanto, kie magras informoj kaj malmultas muziko: bedaŭ-

rinde Vi baldaŭ spertos, ke la tutan kasedaron, kiun Vi eble posedas, Vi jam disaŭdigis.... kaj ke la novaĵoj interesaj por la ekstera publiko ne multas.

Mi neniel volas Vin malkuraĝigi pri tiu iniciato, sed ĝi ege surprizis min: kion Vi planas dissendi? Ĉu Vi posedas sufiĉe multajn materialojn? Ĉu viaj materialoj estas sufiĉe interesaj kaj allogaj por publiko, kiu rapidege enuas pri esperanto (kaj en ĉi zapema epoko haste ŝanĝas al kio ajn alia)? Ĉu Vi posedas longan sperton pri nia afero, bone konas ĝin kaj havas la necesajn kontaktojn en la esperantaj rondoj por certigi regulan alfluon de materialoj post la ioma kolektigo dank'al la anonco? Ĉu Vi, fine, spertas pri radio, tiel ke la programo estos plaĉa?

Mi ŝatus, ke Vi pripensu tiujn demandojn, ĉar ili estas gravaj. Antaŭ ol ekigi publikan (propagandan) iniciaton, bona planado estas esenca. Esperantistoj preskaŭ senescepte estas bonkoregaj amindaj homoj, sed ofte ili iom naive kredas, ke la homoj rilatos al esperanto malsame ol pri aliaj aferoj. Multaj kredas, ke oni varbos nur proponante al la publiko la mirindan solvon esperanto, sed homoj -eĉ kleraj kaj seriozaj- nuntempe malpli interesigas pri la reklamitaĵo kaj pli zorgas pri la kiolo de la reklamo. Se esperanto-programo aspektas ĵurasa, ni simple ŝajnigos la esperantistojn fosiliaj ridinduloj, kaj per tio nia afero rekte malprofitos.

Sed eble Vi jam pripensis ĉion ĉi, kaj tiam mi tuj pardonpetas pro mia teda teoriumado. Estu certa, ke tre plezure nia Asocio helpos Vin laŭ niaj eblecoj. Kiel redaktoro de *Kataluna Esperantisto* mi petas, ke Vi informu min pri la elsendo-horoj kaj -frekvencoj, samkiel pri la enhavo de la programoj, por ke ni anoncu ilin en nia bulteno.

Servoprete Via,
Hektor Alos i Font

Pri informado

Dank' al prelegoj okazintaj en Vilanova i la Geltrú la 22an de januaro 1994, titolitaj *Allò que cal saber de l'esperanto i que ningú us ha explicat* kaj *El jovent esperantista, un moviment únic* far Llibert Puig kaj Josep Maria Milla, falis en miajn manojn la dosiero *Kulturaj valoroj de esperanto* el la Unua Diskut-Kunveno de KEJ (marto 1992).

Post la legado, mi deziras montri miajn plezuron kaj konsenton, kaj danki al KEJ pro tia laboro.

El la debato pri *desuprismo* kaj *desubismo*, mi eltiras miajn proprajn konkludojn, kiujn mi volas submeti je via konsidero. Laŭ mia opinio, la celo de esperantismo ne estas "la fakto, ke kolektivo ekzistas, perceptas sin minoritato kaj vivas esperanton". Mi opinias, ke la ĉefa motivo de nia movado estas atingi situacion, en kiu esperanto estu la oficiala "monda" lingvo. Dume, la vinberoj ne maturas. Verdire, malmaturas kaj ni kaj la ne-esperantista mondo. Ni, ĉar ne kapablas trovi konvinkigajn argumentojn, kaj ili, ĉar "ne vidas preter la nazo".

Esperanto estas kaj estis minoritata movado, kiel ĉiuj "bonaj" movadoj. Minoritato neniam estis en konstanta frustracio (G. Silfer). Ĝi ĉiam estas preta montri al la mondo sian pravecon (erare aŭ ne). Estas iuj membroj, kiuj kelkfoje sin sentas frustraciitaj pro elĉerpiĝo, kaj la aliaj montras sian solidarecon helpante la frustraciitojn eliri el sia frustracio.

Antaŭ la 68a tempesto (Sándor Révész), la movadoj estis "eksteren orientitaj" (unue la mondo estu ŝanĝita, por ke ĉiu movado povu alporti siajn valorojn por la bono de la homaro), kaj poste, iom post iom, ili transformiĝis al "internen orientitaj" (la membroj de ĉiuj movadoj vivu laŭ siaj valoroj sen atendo de ŝanĝoj en

la mondo). Tiun novtipan mondan kulturon markis la transnacia "hipiula" movado.

Por atingi la celon, oni mensogas kaj misinformadas senĝene kaj senĉese, ĉar tio estas kutimo kaj moro de la transnacia komerca propaganda kulturo. Esperantistoj ne inventis tion.

